



"Mein geliebtes Esperanto"

PILO-PRESS

Internacia

Informservo

poŝlibro en ger-
mana lingvo pri
Esperanto ĵus
aperis. Detalojn
vidu sur paĝo 2!

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg/1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 28/76 - 12 jul 1976
Aperas ĉiusemajne

Doktoriga disertacio pri Esperanto

Berlin (GDR) - (pp) La 16-an de junio 1976 Detlev Blanke, estro de la sekcio Esperanto en Kulturligo de GDR kaj sekretario de Centra Laborrondo, defendis sian doktorigan disertacion antaŭ la soci-sciencia fakultato (sekcio germanistiko) de Humboldt-Universitato de Berlin (GDR).

La disertacio, kiu konsistas el du volumoj (170 p. + 26 tabeloj; notoj kaj literaturo 74 p.) portas la titolon: "Planlingvo kaj nacia lingvo, kontribuo por esplorado de iliaj specifaj komunikadaj potencoj, montrita per konfronta komparo de kelkaj problemoj el la vortfarado de Esperanto kaj la germana lingvo" (Plansprache und Nationalsprache, ein Beitrag zur Erforschung ihrer spezifischen Kommunikationsleistungen, gezeigt am konfrontativen Vergleich einiger Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen).

La disertacio i. a. klare montras, ke konscia efikado de la homo je la instrumento lingvo estas tre disvastigita (lingvoplanado), substrekas la fakton, ke sole Esperanto funkcias kiel planlingvo kaj sekve nur ĝi estas explorebla kiel lingva fenomeno. ~~Plue~~ Blanke pritraktas kelkajn bazajn problemojn de la vortteorio de Esperanto kaj de la germana lingvo (morfeminventaro, signifo de la vorto, kombineblo de morfemoj al morfemkonstruaĵoj, motivigo de la signifo de vortoj, nacia influo je la signifo de la vorto en Esperanto, lingva ekonomio).

La ĉefa parto de la disertacio pritraktas la plej gravajn konstru-modelojn de substantivo, adjektivo kaj verbo en la komparataj lingvoj. La disertacio, kiu indikas preskaŭ 400 fonto-verkojn, estas ekspertizita de la profesoroj d-ro Erwin Arndt (germanisto), d-ro Viktor Falkenhahn (slavisto-esperantologo), ambaŭ de Humboldt-Universitato, kaj de d-ro M. J. Isaev, interlingvisto, Moskvo.

Tiu doktoriga disertacio pri "kompara lingvistiko-esperantologio" apartenas al la vere tre malmultaj disertacioj entute, kiuj ĝis nun estas verkitaĵoj pri Esperanto en internacia skalo (Wüster, Manders). Ĝi vekis neantaŭvidite pozitivan eĥon en lingvistaj rondoj kaj sendube malfermos la pordon al pluaĵ seriozaj sciencaj aktivecoj en GDR. La universitato donis por la tuto la maloftan, plej altan predikaton "summa cum laude" (= eminenta). Per tiu disertacio Blanke denove substrekas sian kompleksan profesion agadon por Esperanto, kiu enhavas politikan, organizan kaj fake-sciencan komponentojn.

UEA-eldonaĵoj

Rotterdam (pp) - Aperis nun la Jarlibro 1976 en amplekso de 384 paĝoj. Ĝi entenas la kutimajn informojn pri UEA kaj ĝiaj instancoj kaj la adresojn de la UEA-delegitoj. La antaŭparolon verkis E.L.M. Wensing, ĝenerala sekretario de UEA.

Same aperis la Kongresa Libro pri la 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno kun la kongresa programo, adresaro kaj salut-vortoj de la urbestro de Ateno.

Universala Kongreso de Esperanto 1976

Ateno (pp) - Dimanĉe, la 1-an de aŭgusto 1976, je la 10-a horo, okazos la inaŭguro de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto, en la Hotelo Hilton de Ateno. Inaŭguran paroladon faros d-ro Werner Bormann, viceprezidanto de UEA.

La kongresa malfermo havos lokon en la kongresejo, la Altlernejo por Politikaĵ kaj Ekonomikaj Sciencoj "Pantios", avenuo Singru 136, samtage je la 17-a horo. La malferman paroladon faros D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA.

El la kongresa programo ni mencias:

Dua Ĝenerala Kunsido de UEA: Internacia Kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo.

Podia diskuto: Kiel nuntempe argumenti por Esperanto

Internacia Somera Universitato kaj seminarioj

Teatra vespero: "Lernejo de virinoj" de Molière, ludas Bulgara Esperanto-Teatro

Nova vortaro Esperanta-Kamboĝa

Budapeŝto (pp) - Ĝus aperis la unua vortaro en la serio de vortaroj por parolantoj de ekstereŭropaj lingvoj, kies eldono estas instigata de UEA en la kadro de la tiel nomata "Regiona Agado".

Temas pri vortaro esperanta-kamboĝa verkita de du junaj kamboĝaj esperantistoj, kiuj lernis la lingvon en la konata TESCO-kolegio en Budapeŝto.

La nova vortaro, kiu ampleksas proksimume 2 500 vortojn, estis prezenta de Hungara Esperanto-Asocio, kiu tiamaniere helpis Regionan Agadon de UEA per elspezoj, kiuj egalvaloras pli ol 3 000 guldenoj. La tutan laboron en Hungarujo gvidis la komitatano de UEA kaj sekretario de HEA, Otto Nogrady, al kies komprenemo oni ŝuldas la sukceson de ĉi tiu iniciato.

Kvanton de ĉi tiuj vortaroj jam vojaĝis al Kamboĝo en la valizoj de studentoj reirantaj hejmen.

Ekstereŭropanoj kiuj deziras verki similajn vortarojn, kaj Landaj Asocioj, kiuj deziras same grandanime helpi, bonvolu kontakti la respondeculon pri Regiona Agado de UEA, Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00 176 Roma, Italujo.

"Mein geliebtes Esperanto" aperis

Nürnberg (pp) - Fine aperis la jam de kelkaj monatoj anoncita poŝlibro en germana lingvo "Mein geliebtes Esperanto" (Mia amata Esperanto) de Richard Schulz en la eldonejo Bleicher, Gerlingen. La libro havas la subtitolon: "Wege zum Verständnis und zur Praxis der Internationalen Sprache" (Vojoj al la kompreno kaj praktiko de la Internacia Lingvo).

Formate 11,2 x 18,5 cm, broŝ., 215 paĝoj, prezo 14,80 DM

Oni povas mendi la libron ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, FRG, PSchK Nürnberg 819 56-851

La nekutima libro de skrihokapabla, kelkfoje kaprica kaj ironia aŭtoro ne nur prezentas Esperanton al la ĝenerala publiko, sed povas kateni ankaŭ la intereson de esperantistoj. Oni nur povas esperi, ke la libro trovos multajn aĉetantojn, por ne seniluziigi la kuragan eldoniston.

Seminario "Lingvo kaj Rasismo"

Zagrebo (pp) - En la kadro de la Jardeko de Batalo kontraŭ Rasismo kaj Rasa Diskriminacio, kiun en 1973 proklamis Unuigintaj Nacioj, Jugoslavia Esperanto-Ligo organizas en Zagrebo, de la 12-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1976, internacian seminarion "Lingvo kaj Rasismo" sub la aŭspicio de la Jugoslavia Nacia Komisiono por Kunlaboro kun UNESKO.

La ĉefa temo "Lingvo kaj Rasismo" estos pritraktata en kvin sekcioj:

- 1) Ĝeneralaj esploroj kaj studoj pri lingvo kaj rasismo sur internacia, regiona, landa kaj loka niveloj;
- 2) problemoj de lingvaj minoritatoj kaj de ilia socia kaj kultura integriĝo sen perdo de la propra rasa, nacia kaj etna identecoj;
- 3) sociaj, juraj, edukaj kaj kulturaj aspektoj de la rilato lingvo kaj rasismo;
- 4) problemoj de fremdaj laboristoj pro lingvaj baroj;
- 5) rolo de la Internacia Lingvo kiel komunikilo inter la malsamaj lingvaj komunajoj kaj kiel adekvata instrumento por pli efika internacia batalo kontraŭ ĉiuj formoj de rasismo kaj de rasa diskriminacio.

Lingvoj de la seminario estas serbokroata, Esperanto kaj eventuale aliaj. Adreso: Seminario "Lingvo kaj Rasismo", V. Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

Internacia Konferenco de la "Neŭtrala Esperanto-Movado"

Parizo (pp) - De la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto okazos en Parizo la Dua Internacia Konferenco de la "Neŭtrala Esperanto-Movado". Konferencejo estas Maison des Ingénieurs Civils de France, 19 rue Blanche, Paris.

Prelegantoj estos: Prof. d-ro Ivo Lapenna, d-ro A. Albault, H. Sonnabend, G. Becker, D. Luez, R. Hauptenthal kaj H.D. Maas.

Prof. d-ro Ivo Lapenna prelegos i.a. pri "La Fina Akto de la Konferenco de Helsinki el la vidpunkto de la Neŭtrala Esperanto-Movado".

Prof. Frank pri komunikaj modeloj

Klagenfurt (pp) - "Nur per troigo oni povas elstarigi la esencan"! Tio estis la provoka tezo de prof. d-ro Helmar Frank dum prelego okaze de la "Tago de scienco", aranĝo de ORF-studio Karintio, kiun prof. Frank partoprenis je invito de la Aŭstria Radio. La paderborna kibernetikisto prelegis pri komunikaj modeloj antaŭ rondo de konataj germanlingvanaj eldonistoj, ĵurnalistoj kaj profesoroj de komunikaj sciencoj. La prelego estis disaŭdigata de la aŭstria radio, kaj parte ankaŭ de Deutsche Welle kaj de Deutschlandfunk.

La Esperanto-redakcio de Radio Wien nomis tiun prelegon "sensacia".

Jen la ĉefaj tezoj: Pri la lingvobaroj en Eŭropo kulpas la eŭropaj sciencistoj, ĉar ili rezignis je la komenco de la novtempo pri la latina lingvo kaj "naciigis" la sciencan. Naciaj lingvoj ne servas al la popola interkomprenigo, sed disigas la popolojn. Nek la angla nek la latina taŭgas kiel interkompreniĝlingvo por la estonta Eŭropo. Fine de sia prelego, kiu kaŭzis grandan diskutemon, prof. Frank diris: "La Latina de la tria jarmilo devas esti laŭcele planita sintezo de komunikoteorie avantaĝaj kvalitoj de eŭropaj lingvoj". Ke tia sintezo eblas, pravas la planlingvo Esperanto, kiu certe ne hazarde gajnis pli da signifo lasttempe kiel lingvo de la scienco.

Lingvo-orientiĝa instruado laŭ la Paderborna modelo

Paderborn (pp) - En la pedagogia revuo "aula", n-ro 2/1976 (eldonejo Ihl & Co, D-8630 Coburg) aperis interesa artikolo germanlingva de prof. d-ro Helmar Frank kun la titolo "Sprachorientierungsunterricht nach dem Paderborner Modell" (Lingvo-orientiĝa instruado laŭ la Paderborna modelo). La Paderborna modelo, kiu temas pri klerig-teknologia kaj instruplaniga raciigo de la instruado de fremdaj lingvoj, baziĝas je aŭd-vida (objektivigita) metodo (instru-aŭtomato Robbimat II) kaj la lingvomodelo Esperanto.

Kontraŭ 1,- GM por la sendkostoj interesuloj povas ricevi ekzempleron de tiu germanlingva artikolo kiel specialan represon de Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, FRG.

Broŝuro pri etnaj problemoj

Stolberg (pp) - "Etnaj problemoj en sudorienta Eŭropo" nomiĝas broŝuro (formato Din A 4, 12 paĝoj), kiun eldonis Uwe Joachim Moritz. Prezo 2,- GM inkl. sendkostojn, Haveblas ĉe Uwe Joachim Moritz, Feldstr. 38, D-5190 Stolberg 8, FRG.

Esperanto en radio

Vieno. Speciale dimanĉe matene la elsendo estis bonege aŭdebla. La semajna komentario temis pri la eventoj en Entebbe, la liberigo de la garantiuloj el la manoj de la teroristoj fare de Israelo kaj koncernaj reagoj. La komento defendis Kurt Waldheim, la UN-sekretarion, kies unua reago trovis malaprobbon en multaj okcidentaj landoj.

Berno. D-ro Arthur Baur raportis en sia pasintsemajna prelego pri kongreso de ĵurnalistoj en Vieno, kiun li mem partoprenis. La ja estas mem ĵurnalistoj, nome ĉefredaktoro de "Der Landbote", Winterthur.

S-ro Gacond daŭrigis intervjui s-ron G. Silfer, magistro pri okcidenteŭropaj lingvoj, nun en Kuopio, Finnlando. Ĉi-foje la temo de la intervjuo estis la Kultura Centro Esperantista, kiun Silfer rigardas kiel pozitivan kontribuon por la disvastigo de Esperanto. Laŭ li la agado de KCE estas modela por la agado de multaj Esperanto-instancoj. Pri la evoluo de Esperanto ĝenerale Silfer opinias, ke komenciĝas iu nova periodo de la Esperanto-movado. Temas kredeble pri reiro, pri reveno de la historio. En la komenca periodo de Esperanto, ĝis la naskiĝo de UEA elstaran, brilan rolon, laŭ Silfer, ludis kvazaŭ privataj instancoj. Nur malfrue venis la ideo havi tutmondan Esperanto-movadon. Sajnas ke nun tiu tutmonda organizo kun diversaj valoraj entreprenoj ne plu sufiĉas por kovri la tutan areon, la tutan gamon de la laboro por enkonduki Esperanton en oficialan uzon. Kaj iel ni revenas, diris G. Silfer, al tiuj profesie engaĝitaj seriozaj nukleoj, kiuj ekster la oficiala movado, tamen kun nedubinda kompetenteco laboras sur tiu ĉi kampo kiu estas kaj publikrilata kaj informa kaj eldona kaj pedagogia. Pro tio mi nur povas ĝoji, konkludis Silfer. Efektive tio montras ke la afero evoluas, ke ĝi sekvas sian kurson..

Varsovio. Sur la Varsoviaj ondoj aŭdiĝis dum la Esperanto-Ekspresso la voĉo de malnova amiko, kiuj antaŭ jaroj estis redakciano. Jerzy Grum intervjuis Zbigniew Lutogniewski pri liaj impresoj dum kvar-semajna vojaĝo tra Greklando kaj speciale pri la preparlaboroj por 61-a UK en Ateno. Rememore al la 55-a mortotago de Antoni Grabowski (4.7.1921) oni ankaŭ aŭdiĝis deklamaĵon el Sinjoro Tadeo sur sonbendo, kiun same siatempe preparolis Zb. Lutogniewski. - Dum la unua semajno en julio la Esperanto-redakcio de Varsovio ricevis 81 korespondajojn, certe rimarkinda nombro konsidere ke estas feria tempo. En la politikaj programoj sen grava reago ĝis nun restis la eventoj de Entebbe, la forkonduko kaj fina liberigo de garantiuloj. En la radia ĵurnalo oni parolis pri "agreso de Israelo en Ugando".